Komunikoj kun nur kelkliniaj tekstoj

El EKO 2016-16 sendita en la 20a de majo:

La **26a seminario** komenciĝos unu tagon post la komenco de AMO 25, lige kun la 75a Hispana Kongreso de Esperanto en Herrera del Duque (Ekstramaduro). Ĝi okazos tra tri tagoj (junio 29, 30 – julio 1). Gvidontoj estas Sara Spanò, J.A. de Barrio, J.M. Salguero, Miguel Fernández, Miguel Gutiérrez Aduriz, Irek Bobrzak, Ana Manero. István Ertl, E. Berdor kaj Pablo Busto. Informoj pri la kongreso:

http://www.esperanto.es/hef/index.php/kongreso

El EKO 2016-18 sendita la 25an de junio el Alsóörs

UNIKE RIĈA PROGRAMO por AMO 26

La lokaj organizantoj kaj la nova komisiito pri AMO liveris detalan kaj buntan programon por la postsekva seminario pri Aktivula Maturigo (AMO) en Herrera del Duque, en la okcidenta parto de Hispanio. La seminario okazos antaŭ la parte paralele kun la Hispana Kongreso de Esperanto. Elŝutu la programon (unu-paĝan PDF) por konstati la multon kaj varion de la gvidantoj kaj la trafecon de la diskutotaj temoj. Aliĝintoj al la seminario jam atingis kvardekon, el pluraj landoj. Tiu programo videblas en la programa parto de ĉi tiu prezentaĵo.

EKO 2016-08 el marto portas bildon kaj bazajn informojn. EKO 2016-19 portas ilustritan raporton tuj post la seminario kun multaj retligoj.